Agentejo de S. A. T.
Wien, VI. Sandwirtg. 2.

4-a Jaro. N-o 166 APERAS SEMAJNE 8. Decembro 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty	SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e	ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

PLI BONE AŬ MALPLIBONE?

La polemiko je la temo, ĉu pliboniĝis la situacio de l' laborista klaso en Polio de la maj-revolucio — daŭras ankoraŭ. Lasttempe aperis eĉ speciala broŝuro s. t.: *La situacio de la laborista klaso post la maja revolucio.* La aŭtoro s-ro Staĵinski penas evidentigi, ke ĉi-situacio pliboniĝis kune kun la mastruma situacio de la tuta regno. Kaj ĉar la mastruma situacio pliboniĝis nur (!) dank' al la agado de la maj-registaro, estas do klare, ke ankaŭ la situacio de la laborista klaso pliboniĝis dank' al la sama registaro.

Ke tio ne respondas al la realeco montras la jeno:

En la unuaj tri monatoj de 1927 okazis 121 strikoj en 1392 entreprenejoj kun 15 mil laboristoj kaj perdiĝis 1 miliono 200 mil labortagoj. Dum la sama tempo de l' pasinta jaro 1926, estis nur 98 strikoj kun 25 mil laboristoj kaj 140 mil perdiĝintaj labortagoj.

La ciferoj montras, ke en la tempo de la ora konjunkturo por la posedantaj klasoj, devis la laborista klaso maldolĉe kaj obstine batali por sia seka peco de pano. La entreprenantoj ne tiel facile volis plenumi la justajn postulojn de la laborista klaso.

Ni do vidas, ke la etaj gajnoj de la laborista klaso, la registaron neniel koncernas. Dum la bona konjunkturo la registaro neniel zorgis, ke ankaŭ la laboristoj havu ion de ĝi, — kvankam ĝi havis je tio sufiĉe da eblecoj kaj rimedoj.

Ĉu dum striko, kiam la maj-registaro bonege sciis, ke la entreprenantoj havis oran rikolton, ĉu ĝi ne povis doni tielan premegon, ke estu akceptataj la justaj postuloj de la laboristoj? Ne ekzistas entreprenejo, kiu ne dependus de la kreditoj de l' regna banko! Ĉu ni rimarkis iajn postsignojn de tia volo flanke de l' registaro? Male, ni vidas, ke en la malfacila batalo de la laborista klaso kun la kapitalistoj la registaro staris flanke de la lastaj.

Dum la striko kaj salajr-batalo en la teks-industrio, la regna arbitracio estis bona por la fabrikantoj. Kvankam ĉiuj scias, ke la teks-fabrikantoj havis tian "oran" jaron, kian la teks-industrio jam de jardekoj ne memoras. Kvankam ĉiuj scias, ke nur dank' al la alta doganimposto, kiu ŝirmas la teks-fabrikantojn de la eksterlanda konkuro, ili sen ia malhelpo povas elprofitigi la enlandajn konsumantojn. Tamen malgraŭ tio la registaro iras man' en mano kun la fabrikantoj.

Kaj ĉu en la karb-industrio ne okazis la samo? Ĉu la regna arbitracio ne estis tie por la bono de la karb-potenculoj?

Kaj en la konstru-branĉo? La regnaj institutoj, la regnaj bankoj estas la ĉefliverantoj de la mendoj kaj de la kapitaloj por la konstru-movado. Estas publika sekreto, ke la konstru-asocioj, kiuj antaŭnelonge apenaŭ spiris, gajnis en la daŭro de la lasta jaro milionojn, la gajnoj estis tiel grandaj, ke la konstru-entreprenejoj prunteprenas monon je 5—6% monate kaj ankoraŭ gajnas! — Kaj tamen la striko de la laboristoj, kiuj ne ricevis salajrplialtigon en daŭro de 3 monatoj, daŭris multajn semajnojn! Kaj se la registaro volus, la entreprenantoj plenumus la postulojn de la laboristoj dum 24 horoj, tiel ili dependas de la registaro.

Kaj la registaro mem, kiamaniere ĝi rilatas al siaj propraj laboristoj kaj oficistoj? La registaro posedas karb- kaj petrol-minejojn, rafinejojn, grandajn arbarojn kaj diversajn aliajn monopolojn. Jen antaŭnelonge ni legis, ke la estraro de la regnaj arbaroj plialtigis en la lasta monato la prezojn de ligno je 30%. Kaj ĉu la laborist-salajroj ankaŭ plialtiĝis? Ni legas ofte pri konstanta kreskado de gajnoj en la alkohol- kaj tabak-monopolo. Ili enspezas pli multe ol estis antaŭvidite. Ĉu oni eble aŭdis, ke la realaj salajroj de la laboristoj ankaŭ tiel kreskis?

Laŭ la statistiko de la Internacia Labor-oficejo la salajro de la varsoviaj laboristoj — se oni alprenas kiel ilian realan salajron en aprilo je 100 — prezentiĝas jene en aliaj urboj: en Vieno — 107, en Praha — 115, en Parizo — 137, en Londono — 150, en Kopenhago — 300, en Filadelfio — 427. — Ĉie do pli bone ol en Varsovio!

Fine ni ankaŭ devas rememorigi la konsumadon. La defendantoj de la maja revolucio skribas, ke la konsumado de diversaj amas-artikoloj kreskas, estas do klare, ke la situacio de la popolamaso pliboniĝas.

Ekz. oni konsumis da viando po-kape en Varsovio: en jaro 1924 — 37,5 kg., en 1925 — 42, en 1926 — 37 kaj en 1927 — 39 kg. Sed ĉu la plialtiĝo de 37 kg. en 1926 al 39 kg. en 1927 estus la pliboniĝo? Do, se tiel estas, la tempoj de la fama Grabski en 1925 estis la plej bonaj, ĉar oni tiam forkonsumis 42 kg. po-kape. Kaj fakte konsum-altiĝo je du kilogramoj ja nenion signifas kaj paroli pri pliboniĝo estas absurdaĵo. Kaj due: oni kontrolu kiom da homoj venis el la provinco Varsovion, kiom da oficistoj, riĉuloj kaj

fine da eksterlandanoj, kaj tiam oni scios, kiu konsumis pli da viando? La laboristo nutras sin kiel ĉiam ne per viando, sed per haringo kaj pano... La samo estas kun la suker-konsumo. Se ĝi plialtiĝis de 9,1 kg. jare je 10,5 kg. en j. 1926—27, tio ankaŭ ne estas dank' al la bonstato de la laboristoj. La mezaj klasoj, la riĉaj kaj mez-riĉaj kamparanoj — ili konsumis pli da sukero, sed ne la laborista klaso. Samtempe oni devas atenti, ke kiam ni konsumis 9,1 kg. jare, la najbara Ĉeĥoslovakio konsumis 28,8 kg., Germanio — 20,5, Francio — 24,3, Belgio — 22.

Kiel evidentiĝas, ni estas ankaŭ kun la konsumado en la lastaj vicoj de Eŭropaj ŝtatoj. Kaj multege devos ankoraŭ batali la ĉi-tiea laborista klaso por atingi la saman viv-staton, kian havas la laborista klaso en Eŭropo.

Kaj batali devos la laborista klaso, kiel ĝis nun kontraŭ la kapitalistoj kaj kontraŭ la registaro.

M. O.

Eljidigis *David Glizer (6600).*

Letero el sendependa Jugoslavio

Diskuris la bruo kaj distrumpetis la burĝa gazetaro pri la konstruado de fervojo inter Kraljevo kaj Kragujevac. Al laboristoj oni promesis bonan pagon kaj per varmaj alvokoj oni allogis ilin al tiu parto de l' lando.

Do amase alfluis tien la loĝantoj de Lika, Bosnio kaj Hercegovino, el tiuj ŝtonoplenaj regionoj, kie la malriĉa loĝantaro nutras sin per terpomoj aŭ eĉ nur per arbo-ŝeloj kaj herbaĵo.

Senhonta trompo tie ilin atendis! La konstruadon de fervojo oni ne tuj komencis. La malfeliĉuloj estis devigitaj dume akcepti iun ajn laboron kaj je iu ajn kondiĉo por ne morti pro malsato. —

Ĉe la fervoj-konstruo laboras 3100 laboristoj, kvardek malpli ol 14- kaj centkvindek malpli ol 18-jaraj! La entreprenistoj pagas tre malmulte: al kvalifikitaj laboristoj po 40—50 dinaroj kaj al nekvalifikitaj po 25—30 dinaroj por 13—14 laborhoroj. Oni elprofitas ankaŭ la laboristojn en akordaj laboroj.

Forlasinte siajn familiojn ili pensis, ke ĉi tie ili gajnos sufiĉe por povi forsendi monon al siaj familioj. Sed tiu pago apenaŭ sufiĉas por ilia ĉi tiea nutrado. Ni aldonu, ke en la por ili konstruitaj kantinoj, la manĝaĵoj estas tre karaj. — Tiel aspektas la laborista sorto, kiam oni sekvas la alvokojn de la burĝa gazetaro kaj de iliaj agentoj!

Ne miro, ke la ĉi tieaj laboristoj estas silentaj, malgajaj, duonnudaj. Sed ili almenaŭ pro tia stato liberiĝas de antaŭjuĝo. Ili eksentas la neceson de siaj organizoj. Multaj penas organizigi siajn Kamaradojn. Tio ne plaĉas al la entreprenistoj. Ili komencis kelkajn maldungi. La polico — fidela servisto de l' burĝaro — persekutas aliajn. Se iuj ribelas — oni ilin arestas. Belgradaj malliberejoj estas jam plenaj.

Jen mi mem sur foirplaco vidis amason da tiuj malfeliĉuloj, forpelitaj el laboro. Duonnudaj, senŝuaj, apenaŭ ili stari povas. Forpelitaj, sen mono, sen iuj rimedoj.

Kaj el la 50 milionoj da dinaroj je kiuj sumiĝas la enpagoj de laboristaj asekuradoj la senlaboruloj nek vidas nek palpas ion. La milionoj estas pruntedonataj al burĝaro, kiu per ili ekspluatas la laborist-amasojn.

Kaj dume senlaboruloj pereas pro malsato sur placo en Belgrado antaŭ la parlamento, antaŭ la okuloj de l' ŝtata registaro! *Branko Rajičič (10 164).*



Hungara polico torturas

Kiel la polico havigis atestaĵon kontraŭ komunistoj.

Grava ĵurdeklaro, farita antaŭ notario en Berlino, interrompis tute neatendite juĝprocesón kontraŭ la veraj aŭ supozitaj komunistoj kaj socialistoj en Budapeŝto. Laŭ la ĵurdeklaro oni vidas, ke la polico havigis la atestaĵon kontraŭ la akuzitoj per torturo. Neniu, kiu bone konas la karakteron de la hungara diktaturo, estos surprizata pro la enhavo de tiu ĵurdeklaro. Ĝi nur montras proceduron uzatan ĝenerale en Hungario, kiam oni bezonas atestaĵon kontraŭ politikaj kontraŭuloj. Sed pri tio oni kutime silentas. Tamen, la deklaron ĵuritan kaj atestitan en Berlino, oni ne povas ignori. Kiam la advokato por la defendo legis ĝin dum la proceso, tia estis efekto, ke la juĝado estis prokrastita por kvar tagoj.

Edvardo Rubin estis arestita la 24-an de februaro en ĉambro de la Hungara Socialista Labora Partio. Li estis kondukita antaŭ la altranga policisto Schweinitzer (Ŝvajnicer). Tiu ordonis, ke li rakontu ĉion, kion li scias pri la Komunista Partio. Rubin nenion diris. Laŭ la ordono de Schweinitzer la policistoj kondukis lin en alian ĉambron. Tie ili ordonis al li stari ĉe muro sur unu kruro.

"Kiam mi laciĝis", tiel li skribas en sia ĵurdeklaro, "kaj volis stariĝi sur la alia kruro, li (detektivo nomata Blei) eltiris sian revolveron kaj minacis mortpafi min. Kiam mi jam ne havis forton kaj ne plu povis stari sur unu kruro kaj planken metis mian alian piedon, li alpaŝis al mi, frapis min sur la vizaĝon kaj tiris min je haroj."

Plua Torturo

Poste li estis kondukita en alian ĉambron, kie staris dekkvin aŭ dudek detektivoj. Ili ligis liajn manojn kaj komencis piedfrapi kaj bati lin. Poste ili ordonis al li depreni la ŝuojn kaj ŝtrumpojn. Liaj piedoj estis kunligitaj kaj suprenlevitaj, kaj la plandoj estis batitaj per vipo el felo de bovo. "Mi sentis proksimume dekkvin frapojn," li skribis, "kaj senkonsciiĝis pro netolerebla doloro. Mi rekonsciiĝis post verŝo de akvo sur min. Miaj plandoj doloris terure. Miaj piedoj estis malligitaj, kaj oni ordonis al mi kuri ĉirkaŭ la ĉambro. Mi penis stariĝi, sed ne povis, miaj plandoj estis treege ŝvelitaj kaj doloregis. La detektivoj staris ĉirkaŭ mi, metis min sur miajn piedojn, batis kaj piedfrapis min kaj tiris min cirkle je haroj. Baldaŭ Schweinitzer eniris la ĉambron kaj demandis al mi ĉu mi nun estas preta rakonti; se ne, ili batos min ĝis morto."

La sekvantan matenon Rubin denove estis kondukita antaŭ Schweinitzer. Denove li rifuzis doni iun sciigon pri la Komunista Partio. Denove li estis batata. Oni ligis liajn manojn per rimeno malantaŭ lia dorso kaj igis lin pendi je la rimeno de granda hoko en la muro. Denove li senkonsciiĝis kaj pro batoj rekonsciiĝis. Li estis kondukita antaŭ Schweinitzer kaj la ĉefo de la budapeŝta polico Hecenyi, kiu diris al li, ke li putriĝos en malliberejo, se li ne donos la nomojn kaj adresojn de personoj el Moskvo, kiuj estas en Budapeŝto, se li ne subskribos iajn, jam preparitajn, dokumentojn, kaj se li ne faros kion oni ordonos al li. Hecenyi konsilis al li plenumi ĉion postulatan kaj promesis sendi lin alilanden kun mono, se li konsentos labori por la hungara polico.

Tute rompita pro torturado, Rubin konsentis al ĉio, kaj fariĝis spiono por la polico. En Berlino lia konscienco turmentis lin kaj ... li faris la supran konfeson.

El "The Manchester Guardian Weekly"
(Angla gazeto) Trad. *E. E. Y.*

Ĉiu klera aŭ kleriĝema homo ne povas ne studi la ideojn de *N. Lenin.* Tial ĉiuj esperantistoj, ĉu amikoj ĉu malamikoj de la gvidinto de l' sovetia revolucio, devas nepre havigi al si la verkon:

ŜTATO KAJ REVOLUCIO

tradukita el la rusa lingvo
de *G. Demidjuk*


Form. 18×12, 150 paĝoj. Prezo 1 g. mk.

Colmstr. 1-III, Leipzig O-27.
Mendu senprokraste al **Adm. de SAT.**,

Laborista Radio-Stacio

En Ĉikago, sur la lago Michigan (Miĉigan), la tiea Laboristaro posedas sian propran Radio-stacion. Ĝi komence havis forton de 500 ŭatoj, sed nun la sekretario, N. Nockels[1]), klopodas por duobligi tiun forton, en kiu okazo la stacio povus servi al la tuta nord-amerika kontinento; ĝis nun ĝi atingis ĝenerale proksimume ĝis 800 kilometroj, ĉirkaŭ Ĉikago, sed sin aŭdigis kelkfoje tiom malproksimen kiel Kanado, Florida, Kalifornio, ktp. ĝis 3 200 km.

Pli ol 5 000 000 laboristoj, (Ĉikago estas la plej granda centro de laboro en Usono), posedas inter ili la stacion. Ĝi similas aliajn staciojn ĝenerale, sed en-programigas tion, kio povus interesi speciale la Laboristaron. Krom la disaŭdigo de koncertoj, publikaj festoj kaj diservoj (!) oni aldonas ĉiutage unu horon por paroladoj rilatantaj al la Laboristaro, farataj de kvalifikitaj laborist-gvidantoj aŭ de vizitantoj, inter la lastaj estas citindaj la sekretarioj de Metal-laboristoj en Francio kaj de la Bot-, Ŝu- kaj Led-laboristoj en Germanio kaj hinda sindikatano. La stacio diskonigas pri la laborista problemo okaze de strikoj aŭ disputoj; ankaŭ ĝi estas la oficiala dissenda medio por la Muzikista Aktora kaj Instruista Sindikatoj. Plue la farmistoj, kiuj estas tre multnombraj ĉirkaŭ Ĉikago, profitas en diversaj manieroj de la Laborista Stacio.



La Laborista Radio-Stacio en Ĉikago

Kiam la stacio estis nur projekto, granda kontraŭstaro estis renkontita ĉe la Departemento de Komerco, kiu diris, ke ĉiuj haveblaj ond-longoj estas jam uzataj kaj, ke eĉ se la stacio estos konstruita, oni ne donos la necesan permeson. Sed N. Nockels tiom bataleme kaj trafe agis, ke fine oni donis la permeson.

[1]) Estas K-doj, kiuj deziras, ke ni ĉiam apud la nomo meta ĝian prononcon. En supra okazo ni estas tute embarasitaj. Ni ne scias ĉu la nomo estas sveda, germana aŭ alilingva. El tiu ekzemplo K-doj jam povas vidi, ke la problemo ne estas tiom simpla, kiel ili opinias, — kaj la redaktora tasko ĉi rilate estas nefacila. — *Red.*

Kiel sovetiaj laboruloj subtenas sian registaron

Nepra kondiĉo por efektivigo de socialismo estas industriigo de la lando. Tial sovetia registaro tutforte penas konstruadi novajn fabrikojn. Sed ĉiu scias, ke por konstruado necesa estas mono. Ĉu sovetia registaro disponas la necesajn monrimedojn? Ne! Sed ĝiaj laboruloj ŝatas ĝin kaj subtenas.

La 1. oktobro kj. sovetia registaro eldonis akciojn de ŝtata prunto je sumo de 200 milionoj da rubloj. Ĝi esperas disvendi ilin ĝis la 25. novembro kj.

Por plifaciligi al laboruloj la aĉeton la registaro: 1-e dividis unu akcion je kvin partoj po 5 rubloj, 2-e ĉe kolektiva aĉeto permesas sep-monatan partopagon, 3-e disvendas la akciojn en laborejoj.

La esperoj de la registaro ne estas vanaj. La vendado de akcioj okazas tre vigle. La fabrikoj konkuras inter ili: Kiu aĉetos plejmulte? La laboristoj ankaŭ konkuras: Kiu pli multe?

Kiu povas, akiras 10, 20, 30 akciojn. Kiu ne povas akiri eĉ unu, tiu aĉetas kolektive. Ĉiu opinias sia devo kunhelpi al la registaro.

En multaj fabrikoj la laboristoj aĉetis akciojn por la 40% de la monata laborgajno.

Dank' al tiu subteno nur dum la unuaj du semajnoj jam estis venditaj akcioj po 120 milionoj da rubloj t. e. la duono de la prunto.

Laboruloj ne lasas sen helpo sian registaron.

Rostov-Don. *Baranov, V.*

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo oka)

AL KELKAJ KORESPONDANTOJ

Mi ne ankoraŭ finis la unuan ĉapitron de ĉi tiu studo kaj jam venis kelkaj leteroj de K-doj, kiuj diras proksimume jenon: "Kun granda intereso ni legas vian artikolaron pri Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo, sed ŝajnas tamen al ni bedaŭrinde, ke vi liveras ĝin popece. Kial do ne eldoni vian verkajon broŝur- aŭ libroforme?"

Iel mi konsentas kun vi, K-doj, sed ĉu do vi ne scias, ke jam kelkaj bonaj manuskriptoj estas finpretaj kaj atendas, ke nia Eldonfako havu monon por liveri ilin al kompostistoj? Aliflanke oni ofte diris, ke mankas al nia sennaciismo sufiĉe ampleksa teoria surbazigo. Inter du malbonoj, mi elektis la pli malgrandan.

Cetere, el ia vidpunkto, estas eble preferinde, ke tiu ĉi laboro estu unue liverata popece al la SAT-anaro, kiu tiel povos fari rimarkojn, kritikojn kaj finfine decidi ĉu vere la verko estas libroforme eldoninda aŭ ne.

En la enkonduka artikolo (vidu n-on 157) mi avertis, ke eble mi estos devigata esplori la temon pli larĝe ol mi unue intencis. Komencinte la laboron mi ja konstatas, ke mia averto ne estis senbaza.

Eble kelkaj K-doj pensos, ke mi deflankiĝas de la temo. Tute ne. Por havi ĝustan komprenon pri nia epoko kaj pravigi nian hipotezon, kiu konsistas en tio, ke la historia procezo tendencas nepre al sennaciismo, ke ĉiu progreso estas rezulto de artefariteco, necesas havi kelkan scion pri malaperintaj civilizacioj. E. L.

La Egipta "Internaciismo"

Kiel ĉe nia epoko, imperialismo kaj internaciismo kunekzistis, se ne laŭ la sama amplekso kaj doktrina difiniteco, almenaŭ kiel pli malpli konsciaj tendencoj. Pri tio mi lasu la parolon al A. Moret kaj Davy, la aŭtoro de la verko en kiu grandparte mi elĉerpis la materialon por ĉi tiu ĉapitro:

"Dum la regado de Amenofis la III-a, la reciproka penetriĝo de la diversaj orientaj civilizacioj estas efektivigita fakto: Babilonanoj, Mitanianoj, Hititoj, Egeanoj komunikas kun Egiptio. La interrilatoj ne plu estas necertaj, nek individuaj kiel en la estinta tempo: post la granda interpuŝiĝo de la armeoj, anstataŭita de negocistaj interrilatoj, la reĝoj kaj iliaj familioj, iliaj administrantoj, iliaj agentoj individue interkonatiĝas, sin ligas per amikaj kaj edziĝaj interrilatoj, faras komercajn kontraktojn, skizas kunagajn planojn pri milita kaj politika ekspansio, interŝanĝas siajn ideojn, siajn projektojn, siajn gustojn pri arto kaj sur ĉiu kampo. Granda komerca, idea, artinterŝanĝa, ekonomia fluo cirkulas de nun inter ĉiuj ĉefurboj, Babilono, Ninivo, Boghaz-Keuio, Knososo, kaj sin fine direktas, kiel multbranĉa riverego, al la Nila delto, kie ili kunfandiĝis en la egiptian civilizacion. Por la unua fojo, laŭ nia scio, *en la monda historio* la homoj ekkonscias pri la preferindecoj de tutmonda paco kaj sentas la utilon de komuna politiko: per sama interkonsento, *volentes nolentes* (vole nevole), ili konfide komisias ties direkton al Egiptio, kies militan, politikan kaj materian superecon ili konfesas. La diplomatiaj dokumentoj unuafoje uzas formulojn, kiuj spegulas la amikecon de la popoloj kaj princoj: "havi nur unu penson", "havi nur unu koron", — terminoj, kiuj mirinde karakterizas la evoluon de la spiritoj al *ia internaciismo.*"

Ni ne forgesu, ke la tiutempa ideologio, kiu direktis la socistaton povis esti nur religia. La paco de Oriento signifis, ke la dioj de la diversaj popoloj ĉesis interbatali kaj faris packontraktojn. Reg-is dum la tuta unujarcenta egiptia paco tia toleremo, ke ne okazis religia kon-

NACIA LABORISTA UNIVERSITATO

Kianuan, Ŝanhai, Ĉinio

Ŝanhai, Sept. 1917

Karaj Kamaradoj!

Kun granda plezuro ni informas al vi pri fondiĝo de *Nacia Laborista Universitato* kaj ĝia *Laborista Instituto,* la 19-an de septembro 1927. El la programo ni citu jenon:

Celo: L. I. de N. L. U. celas entrepreni propagandon pri laborista edukado; esplori kaj studi laboristajn temojn; kulturi batalantojn por la laborista movado kaj tiel okazigi, ke laboristoj mem praktiku sian liberiĝon. — *Plano:* 1. Labora edukado, 2. Revolucia edukado, 3. Perfektula edukado, 4. Vivrimeda edukado. — *Grado:* 2. Regula kurso da 100 anoj lernas 3 jarojn laŭ jenaj temoj: Nacia literaturo, Esperanto, Franca literaturo, Sociologio, Ekonomio, Socia problemo, Historio de socialismo, Historio de laborista movado, Tripopolismo (?), Ĉinia historio, Moderna historio de tutmondo, Socia psikologio, Socia etiko, Matematiko, Fiziko, Ĥemio, Meĥaniko, Desegno ktp. 2. Licea kurso da 100 anoj lernas dum 3 jaroj kun 13 temoj. 3. Instruista kurso da 100 anoj lernas 1 jaron kun 20 temoj. 4. Ekzerca kurso da 100 studentoj lernas 1 jaron kun 20 temoj.

Resume, 400 studentoj ekzamene varbitaj el tuta Ĉinio laŭ jenaj kondiĉoj: 1. Studentoj de L. I. ĉiutage devas sin okupi per muskola laboro ne malpli ol 4 horojn. 2. Studentoj de L. I. estonte devas eniri Laboristaron kaj sindoneme helpi ĝin por revolucieme influi, tial se vi volas riĉuliĝi post gradiĝo, ne venu al la ekzamenejo. 4. L. I. opinias, ke la revolucio devas sin bazi sur ĝusta teorio kaj objektiva fakto.

L. I. akceptas studentojn kaj donas pensionan loĝejon, kurskopiojn, manĝojn kaj uniformon per la financo de N. L. U. Post gradiĝo la studentoj estas delegotaj al respondaj postenoj krom tiuj, kiuj volas lernadi plu.

L. I. situas antaŭ stacidomo de Klanuan (aŭ Kiangwang) apud Ŝanhai (aŭ Shanghai), Ĉinio. Samloke sin trovas Ŝanhai Industria Ekzercejo, kiu antaŭe estis publika instalo de entreprenistoj, sed nun apartenas al L. I. Ĝi havas fabrikojn kun maŝinoj de tipografio, meĥaniko, fermetio, ladkestoj, lampoj, tapiŝoj, ludiloj, pomado, kaj kelkaj aliaj estas planitaj. L. I. havos bibliotekon, muzeon, tradukeldonejon, hospitalon, knabolernejon ktp.

Nacia Laborista Universitato nun preparas fondon de unu plua instituto por terkulturistoj dum marto 1928 j. L. I. nun havas 30 instruistojn, el ili troviĝas 10 anarkistoj, kiuj okupas postenojn por gravaj kursoj: ekonomio, sociologio, socia problemo, esperanto, socialista historio ktp. Kaj ankaŭ el 400 studentoj sin trovas 30 junaj anarkistoj; ili unuanime laboras por anarkismigi tiun ĉi universitaton.

K-doj el tuta mondo! Helpu la ĉinan L. I. de N. L. U., sendadante eldonaĵojn, raportojn kaj alvokajn leterojn el via regiono! Ni ankaŭ estas eldononta esperantan kaj ĉinajn revuojn; tuj post apero ni sendos al vi.

Kun revoluciema saluto!

P. S. Bonvolu traduki ĉi tion kaj sendi al ni la gazetojn, kiuj publikigis ĝin.

Vi faris, kun multe da sukceso, agitadon por esperanto; via grupo estas multanara, kaj via memkontenteco estas videbla.
Vi tamen faras grandan eraron, se vi opinias, ke tio sufiĉas por firmigi kaj certigi la sukceson de nia afero. Vi devas plie atingi, ke viaj varbitoj ellernu la lingvon kaj ke la ellernintoj legu nian literaturon.
Aĉetu, aĉetigu la SAT-librojn; Abonu, abonigu la SAT-gazetojn.

HUMORAĴO

Inter knabinoj

— Jakobo diris hieraŭ al mi, ke li fordonas al mi sian koron . . .

— Ba! regluitaĵo! Li diris al mi, pasintan semajnon, ke mi ĝin rompis al li...

---

flikto inter la diversaj popoloj, kies raso, lingvo kaj kredo estis tre diversaj.

Homoj, kiuj vivis en tiu epoko, dum kiu regis ia internaciismo, povis kredi, ke la mondo trovis definitivan ekvilibron, ke la paco eterniĝos.

Tiel tamen ne okazis, kaj eĉ la faraonoj pli malpli klare ekvidis, ke tiu ekvilibro estas tre nefirma, ke necesas iu kulto komuna al ĉiuj popoloj, iu imperia diaĵo, kiuj superregos ĉiujn aliajn. Tiam estiĝis kaj disvastiĝis la kulto al la *Suno,* kies surtera enkorpiĝo estis la faraono. Sub la regno de Amenofiso la IV-a, unu el la grandaj imperiestroj de la unuiĝinta Oriento, *Atono* (suna disko) fariĝis la ĉefdio. Sur la monumentoj oni vidas ĝin reprezentitan sub la formo de flugilhava disko. Tiam ĉiuj homoj estas filoj de l' suno kaj sekve regatoj de la faraono. "Por la unua fojo, la religio estas komprenata kiel ligilo, kiu kunigas homojn de malsamaj rasoj, lingvoj kaj haŭtkoloroj . . ." *(Moret kaj Davy).*

Tiu povo de internaciisma politiko estis tro antaŭtempa. La egiptia imperio, kiu atingis sian apogeon ĉirkaŭ la jaro 1400, ne plu ekzistis 40 jarojn poste. La pastra klaso kun la helpo de l' popolo, kiu estis gardinta sian tradicieman kredon, forte opoziciis. Amenofizo la IV-a kaj liaj partianoj estis konsiderataj kiel perfiduloj kaj fremduloj. Okazis ribeloj kaj dum longa tempo regis en Egiptio grandega malordo. Diversaj popoloj invadis la landon.

Aliaj faraonoj, la Ramzesoj, provis pli malpli sukcese restarigi unuecon kaj pacon en Oriento. Fakte, dum kelkaj jarcentoj, militoj sekvis militojn. La "Egiptia paco", kiu estis daŭrinta dum tuta jarcento, fariĝis nur historiaĵo.

Pli poste, hindo-eŭropanoj, sub la gvidado de Dario, de Aleksandro, de la Ptolemoj kaj de la Cezaroj, restarigos, sur la ruinoj de la egiptia imperio, ian unuecon kaj pacon en la orienta mondo.

Ŝajne ne plu ekzistis io komuna inter tiuj grandaj imperioj kaj la malgrandaj ĉeloj, la klanoj, kiuj unue konsistigis la socian vivon en la Nila delto. Tamen oni povas konstati, ke la totemo-fetiĉo, kiu estis la unuecigilo kaj rekonigilo de la klananoj, aliiĝite retroviĝas sub la formo de reĝaj insignoj, unue la falko kaj poste la flugilhava disko. La *mana*-o, kiu animis la primitivan klanon, daŭras ekzisti sub la nomo *ka*-o kaj enkorpiĝas en la persono de la reĝo. La tiutempaj teologoj klarigis, ke la *ka*-o estas la dia substanco, la genio de la raso.

Ĉu hodiaŭ simile ne parolas la apologiistoj de la patriotismo?

Dum la daŭro de kelkaj jarmiloj, la antikva Egiptio atingis tre altan civilizacion. La faraonoj estris potencan imperion, kaj unu el ili, Amenofizo la VI-a, provis apliki internaciisman politikon. Ni povus aldoni, ke dum sufiĉa longa periodo ekzistis eĉ ia socialismo: "La reĝo ne opinias malfortigi sian aŭtoritaton per la partoprenigo de tuta sia popolo al la mastrumadoj de siaj bienoj. La tiama reĝimo alproksimiĝas al ia ŝtata socialismo: Faraono restas la posedanto de la bienoj kaj de la vivo de siaj regatoj, sed kondiĉe, ke ĉio celu la socian bonon. En la Ŝtato, la reĝo *servas;* laŭ lia ekzemplo, ĉiu homo, la plej riĉa kiel la plej malriĉa, laboras por la socio, ĉu sur la kampoj, ĉu en la metiejoj, ĉu en la ŝtataj oficejoj; eĉ la diaj kaj naturaj fortoj estas varbitaj por partopreni la kolektivan vivon[16]).

Kaj tiu mirinda socia konstruo forfalis; pereis la potenca imperio, ĉefe pro tio, ke la idea superstrukturo de la socio tro forte baris al normala evoluado.

(Pluo sekvos.) *E. Lanty.*

---

[16]) *La Nilo kaj la Egiptia Civilizacio* de A. Moret. Biblioteko de Historia Sintezo.

SENNACIULA STUDENTA PAĜO

SUB LA KONTROLO DE STUDENTA FAKO, ORGANIZITA ĈE JUNULARA SEKCIO DE SAT

AL SAT-studentaro!

Jam ĉie en Universitatoj, Institutoj, Akademioj, Superaj lernejoj ktp.... komenciĝis nova lernjaro. Studentoj denove komencis sian laboron. Studenta vivo ekbolis. Ankaŭ SAT-studentoj devas ekkomenci la por- kaj peresperantan laboron inter la laborista studentaro. Pri poresperanta laboro ni multe ne parolos, ĝi ja estas klara. La peresperanta laboro — estas nova laboro. Ĝi devas efektiviĝi per nia Studenta Sekcio.

Unue: Por starigi internacian studentservon (korespond-interŝanĝejon) necesas, ke ĉiu Studento-SAT-ano aŭ grupo urĝe informu al la Sekcio sian adreson kaj dezirojn: kun kiu li aŭ ĝi (grupo) deziras interkorespondadi aŭ interŝanĝadi materialon. Adresojn de grupoj ni enpresos en nia Paĝo.

Due: Por fari nian Studentan Paĝon pli interesa — necesas, ke SAT-studentaro aktive kunlaboru en ĝi. Ni faras enketon inter studentoj de ĉiuj landoj pri jeno:

1. Revolucia Studenta Movado en via lando;
2. Ekonomia Situacio de Studentaro (buĝeto de studento de diversaj klasoj);
3. Tri tagoj el Studenta Vivo.

Ni petas K-dojn, ke ili verku artikolojn pri suprenomitaj temoj. Respondojn ni presigos en nia Studenta Paĝo.

Trie: La Interliga laboro. Ĝi estas grava pro tio, ke ĝi ebligas al ne esperantistoj interrilati kun eksterlandanoj. Ĉiu SAT-ano aŭ grupo ekinteresigu studentajn organizojn de via urbo ekkomenci korespondadon kun la samaj organizoj el alia lando. Ĉion vi devas aranĝi per nia Sekcio — ĝi estu nia centrejo.

Lastmonate novaj K-doj aliĝis al nia sekcio, ...sed dume ne ĉiuj SAT-studentoj... K-doj el Lyon, el Oriento kaj aliaj urboj, kial do vi ne aliĝas? *D. S.*

*

SAT-studentaro

Flame salutas Studentaron de Sovet-Unio, festantan la X. datrevenon de Oktobra Revolucio.

Nur Oktobra Revolucio malfermis la pordojn por la laboristoj kaj kamparanoj de Sovetio.

Ni faros ĉiuj ĉion eblan por proksimigi baldaŭan alvenon de Tutmonda Oktobro. *Studenta Sekcio ĉe SAT.*

En Respublika Germanio

Preskaŭ 95% de tuta Studentaro en Germanio estas filioj de bienuloj, oficistoj, burĝoj, entreprenistoj ktp. Laboristoj aŭ vilaĝanoj estas tre maloftaj. Dum la reelektoj de rektoro kaj universitata gvidantaro ĉiam sukcesas la kandidato de faŝista organizo. Oni devas noti, ke ĉiu faŝist-studento estas preskaŭ mastro en universitato. Subvenciojn oni donas nur al tiuj, kiuj promesas eniri en studentan faŝistan organizon. Al ĉiu enskribiĝanto oni donas senpagan vestaĵon, subvencion kaj solene akceptas lin en organizon. La biero fluas kvazaŭ rivero. Drinkemaj studentoj komencas aventurojn kaj matene oni ĉiam disveturigas la vunditajn studentojn en iliajn hejmojn. En la germania respubliko oni pli amas Bismarkon kaj Vilhelmon ol iun alian. La kulto de ĉi personoj estas sankta. Eĉ Hindenburg mem ĉeestas ofte la festojn de Studentaro dediĉitaj al "kara patrio". Kantojn *"Germanio super ĉio"* oni povas aŭdi ĉie ĝis frua mateno. Sed rimarkinda estas nur unu fakto: Proletar-studentaro vivas en tre malbonaj kondiĉoj, al ili oni ne donas eĉ unu pfenigon. Sed en la sama tempo oni trovas centojn da markoj por diboĉaj baloj "de faŝistaj karnavaloj kaj organizo". Kie oni prenas ĉi-monon? Certe el la regna kaso! Registaro ja zorgas, por ke iliaj anstataŭontoj estu "bonaj homoj", kiuj konservus la tradiciojn de "avoj", la tradiciojn de "Sankta Fera Germanio!"

Sed... kreskas nova Studentaro! Pri ĝi alian fojon. *Max.*



Tipoj de Siberiaj Studentoj

*

Revolucia studenta movado en Hispanio

Laŭvere proleta organizo studenta ne ekzistas. Antaŭ unu jaro funkciis "Libera organizo de Studentoj", kie oni povis labori iom, sed la registaro eksterleĝigis ĝin, malliberigante kaj kondamnante la estraranojn, redaktorojn kaj kunlaborantojn de ĵurnalo, organo de tiu asocio: *La Studento.* En ĝi estis publikigita per-esperanta materialo (SAT-a). De tiam mi plu ne aŭdis pri tiu-specaj asocioj. Suprenomita Asocio havis sidejon en Madrid.

Nun oni permesas asociiĝi nur al katolikaj studentoj. — La studentoi, miaj amikoj, tre atente aŭskultas min, kiam mi legas Studentan Paĝon. Nunjare en Medicina Fakultato de Barcelona mi starigos kurson de esp-o.

(337.)

*

De Sekretariaro

Ne ĉiuj K-doj sendis al ni balotlistojn kaj sian konsenton pri la statuto de nia Sekcio. Do ni petas urĝe ĉion sendi al ni.

Listo de land-konsuloj aperos en n-o 7 de nia paĝo. K-doj, kiuj konsentos labori kiel konsuloj — anoncu sin ĉe la Sekci-sekretario.

*

Internacia Ekspozicio de Superaj Lernejoj

Ĝi okazos en urbo Bonn en Germanio en 1928. Ĝi celas doni bildon pri atingoj de diversaj Universitatoj, kaj devas montri rolon de Universitatoj en kultura vivo de popoloj. La ekspozicio ankaŭ celas restarigi internaciajn interrilatojn inter diverslandaj scienculoj kaj superaj lernejoj, kiuj estis interrompitaj dum milito.

*

Malfacila financa situacio de Hungariaj Universitatoj

En nuna jaro Hungariaj Universitatoj laboras en treege malbonaj financaj kondiĉoj. La registaro nenion aldonis al malnova buĝeto! Prof. Gross skribas en la gazetaro — "se en nuna jaro registaro ne pligrandigos buĝeton de Universitatoj — ni riskas fiaski kaj tio signifos malprogreson por Kulturo".

*

NIA POŜTKESTO

337. Vian materialon por Sovetia ĵurnalo ni peris. Dankon.

Liberano. Parti-polemikaj artikoloj se ili rilatas eĉ al Studentaro ni ne presos. Pri tio ja multe oni skribis en "S-ulo". Nia asocio ja estas unuec-fronta organizaĵo!

FEUF. Dankon pro viaj materialoj. Daŭrigu sendadon de materialo pri via agado.

Ne forgesu ĉion por Studenta Paĝo sendi al redaktoro de paĝo: *D. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33.* — El blankaj landoj sendu al: H. Muravkin, Berlin, Wielandstrasse 11—3, Charlottenburg IV.

"Mi apenaŭ havas monon, por aboni niajn naciajn gazetojn, kiel mi do povus aboni Sennaciulo-*n", skribis al ni iu K-do, montrante per tio sian naciemon.*

Abonu unue kaj precipe vian Sennaciecan Organon.

TRA ESPERANTIO

EL LA REDAKTEJO

En kelkaj n-oj de "S-ulo" ni alvokis al K-doj, partoprenintaj la VII-an Kongreson kaj restintaj kelkan tempon en Francio, ke ili rakontu pri siaj spertoj, ke ili diru siajn rimarkojn kaj tiel ebligu ekkoni la diferencojn ekzistantajn inter la diverslandaj moroj kaj kutimoj. Senefia restis la alvoko: ni ne ricevis eĉ unu manuskripton pri tiu temo.

En la n-o 158 ni publikigis artikolon pri sektoraj konferencoj kaj sciigis, ke ni konsentas malfermi diskutadon pri la temo. Sekve de tio, ni ricevis *nur unu* artikolon, de K-do 6727, kaj tiu artikolo tute deflankiĝis de la temo kaj sekve ne estas publikiginda.

Estas do evidente, ke la menciitaj temoj ne interesas multe la SAT-anaron. Ni simple notu la fakton.

La rubrikoj: "Tago el mia vivo", "Mia buĝeto" trovis ĝenerale bonan akcepton ĉe la Legantaro kaj venigis abundan materialon. Ne ĉiuj "Tagoj" estas tamen same interesaj; kelkaj eĉ ne indas publikigon. La imitado estas ja terure efikanta leĝo! Necesas liberiĝi el tiu leĝo kaj celi atingi ian originalecon. Tiuj simplaj raportoj pri la vivo de SAT-anoj povos enteni trafan instruon nur, se ili venos el ĉiuj landoj. Kaj estas rimarkinde, ke el Usono, el Japanio, el Ĉinio venis ĝis nun ne eĉ unu "Tago", ne eĉ unu "Buĝeto". Tio estas tre bedaŭrinda kaj malebligas fari komparojn kaj konkludojn.

De K-doj 7845 kaj 9082 (Kiev) ni ricevis tre interesan artikolon, kiun ni ne povas publikigi pro manko de loko, en kiu ili sugestas, ke "S-ulo" devas enkonduki novajn rubrikojn, kiel ekzemple: "Nia Klubo", "Nia Biblioteko", "Niaj amataj Verkistoj", "Nia Gazetaro", "Nia Kooperativo", "Kiel laboras nia SAT-rondo" ktp. Superfluas diri, ke ni tute konsentas kun niaj K-doj. Kelkfoje ni jam ĝeneral-trajte skizis similan programon por nia gazeto. Ni do profitas la okazon por diri, ke bonvenon trovos tia materialo por la menciitaj rubrikoj. Ni nur denove insistas, por ke la K-doj verku koncize kaj objektive. Frazecaj kaj tro longaj artikoloj ne povos trovi lokon.

Ĉar ni trovis momenton por babili kun la Legantaro, ni altiru la atenton de sufiĉe multaj K-doj al neceseco starigi planon, kiam ili verkas artikolon. Oni ne sendu "salaton" en kiu miksiĝas diversaj temoj. Antaŭ ol verki, necesas pripensadi, necesas ordigi la faktojn kaj ideojn, limigante sin nepre je la difinita temo. Ne ĉiu povas verki talente, sed ĉiu povas akiri klarecon kaj koncizecon per lernado kaj atento.

Ni ankaŭ ripetu, ke fuŝskribitajn, nelegeblajn artikolojn ni ne akceptas. *E. L.*

INTERLANDA ESPERANTO-KORESPONDADO KIEL EDUKILO AL SENNACIISMO

(Fino)

La lastan tempon rapide plilarĝiĝas infan-korespondado. Ni neniel devas malŝati tiun ĉi emon de infanoj nur pro tio, ke la nuna infana korespondado ne kontentigas la gvidantojn de infankursoj. Vere tian utilon oni vidas nur en tio, ke ĝi perfektigas la infanojn en la limo (pri kio oni povas dubi[1]), ĉar de idea vidpunkto, ĝi estas tre malriĉa. Krom tio, ĝi ne estas longedaŭra: elĉerpinte ĉiujn kutimajn temojn (pri vetero, familio, lernejo, amuzoj) kaj sian tutan provizon de konataj frazoj, interŝanĝinte bildetojn, fotojn kaj poŝtkartojn, ili ĉesas la leterskribadon.

Certe oni ne povas nei la utilon (ekzercigan) eĉ de la plej senvaloraj (laŭ enhavo) leteroj, tamen mi estas konvinkita, ke infanoj povas kaj devas korespondadi pli serioze[2]) kaj eĉ en aĝo de 11—13 jaroj elvolvi sub la influo de sennaciecaj ideoj. Kio do estas bezona por tio?

Korespondantoj — infanoj kaj plenaĝaj kursanoj devas pasi specialajn studojn de leterskribado, lerni ĝian teknikon kaj internan flankon. Manko de tiuj scioj estas sentata ne nur de esperanto-pedagogoj, sed ankaŭ de instruistoj de gepatra lingvo, kiuj plendas, ke la nuna generacio ne scipovas skribi bonan leteron.

Estus tre utile instrui ĝuste adresigi la leteron; skribi legeble proprajn nomojn, klarigi lokajn esprimojn, prononcon de naciaj nomoj ktp., ĉar pro tiuj "negravaĵoj" ofte perdiĝas vane multe da laboro[3]).

Ankoraŭ pli grave estas instrui la arton skribi interesan, taŭgan, utilan aŭ edifan leteron. Plej facile tia instruo povas okazi en la lernejoj dum lecionoj de gepatra lingvo kaj esperanto, kiuj donas eblon tuj eluzi la akiritajn sciojn.

Ni denove venas al la konvinko, ke *esperanto devas eniri la programon de la lernejoj kiel lernobjekto egalrajta kun la aliaj.* Ĉiu S-ulo devas klopodi pri tio en sia lando, ĉar per lernejoj esperanto povas eniri la vivon. La lernanta infanaro kaj junularo estas la plej taŭga materialo por sennacieca edukado de la homaro. Tiu edukado estas parte atingebla per *sisteme organizita celkonforma interlanda korespondado* de lernantaro de diversaj landoj. Por tio estas nepre bezona enkonduko de esperanto en lernejojn de ĉiuj landoj. Ĝis tiu tempo, kiam esperanto okupos en la lernejoj de ĉiuj landoj lokon konforman al sia graveco, ni estas devigataj serĉi aliajn vojojn por sennaciece eduki infanaron kaj junularon per interlanda esperanta korespondado. Ni aranĝu kursojn por infanoj, rondetojn, ĉeletojn de esperanta movado en lernejoj kaj en infan-kluboj.

Al ĉiuj K-doj, kiuj volas akceli sennaciecan edukadon de infanoj per esperanto mi rekomendas fari interesan kaj tuj efektivigeblan eksperimenton, nome *korespondadon de plenaĝaj esperantistoj-S-uloj kun infanoj.* Ĉu ĝi ŝajnas stranga? La infanoj ja volonte korespondadas kun plenaĝuloj kaj la lastaj, precipe tiuj, kiuj ŝatas la infanojn, ankaŭ volonte respondas al ili. Post ĉiu anonco de infangrupoj pri korespondado oni ĉiam ricevas kelkajn leterojn de plenaĝuloj. Nu, kial do ne eluzi tiun ĉi naturan emon? Ni provu konformigi ĝin kun niaj celoj. Ni aperigu novan specon de korespondantoj — "esper-onkloj" (ĉar la infanoj ofte sin turnas al plenaĝuloj per "kara onklo".

Ĉiu Kamarado povas elekti unu-du eksterlandajn infanojn, aranĝi la korespondadon kun ili kaj esti gvidanto, instruisto kaj edukisto por ili. Vere novaj horizontoj malfermiĝos rezulte de tiu ĉi korespondado: vi pripensas kaj preparas la planon de via agado, antaŭe la perfektigo de viaj malgrandaj "genevoj" en la lingvo esperanto kaj iom post iom vi enkondukas ilin en la sferon de sennaciismo (tio ne estas tre facila tasko). La korespondado fariĝas pli kaj pli interesa por via lernanto kaj, mi estas konvinkita, ke ankaŭ por vi mem. Ĝi (via korespondanto -ino) kreskas aĝe kaj spirite, ĝi fariĝas adepto de la SAT-movado, Sennaciulo de la infaneco, ĝi partoprenas SAT-kongresojn, ĝi vizitas sian maljunan (jam . . .) amikon "esper-onklon" en lia hejmo kaj . . . mi lasas al ĉies imagkapablo fini la bildon, ĉar ĝi estas senfine variebla, kvankam ne tute fantazia.

Mi petas indulgon pro nekompleteco de mia artikolo. Mi tute ne pretendis eldiri ion novan aŭ pritrakti la temon plenscience. Mi estos kontenta, se mi, ekspozinte la praktikajn konkludojn el miaj personaj spertoj, altiris la atenton al la grava parto de l' sennaciisma movado, la interlanda korespondado, kaj mi ĝojos se aliaj Kamaradoj, pli lertaj ol mi, daŭrigos kaj kompletigos miajn modestajn observojn[1]).

V. Vozdvijenskij (Odessa), SAT-ano 4024, instruisto de Muziklaborlernejo (Muztrudŝkola).

[1]) Ĉar pro malriĉeco de ideoj, la esprimoj estas malriĉaj, sekve ankaŭ la lingvo.

[2]) Krom la personaj spertoj de la aŭtoro, tion pruvas la faktoj komunikitaj de s-ro W. Hahn (Gohlis-Dresden) ĉe la konferenco "Paco per Lernejo" en Praha; certe la lasta gvidis la korespondadon de siaj lernantoj laŭ pure pacifista "neŭtrala" direkto, sed la praktika flanko de lia eksperimento valoras ankaŭ por ni, revoluciaj S-uloj. — *Noto de la Red.*

[3]) En poŝtejoj kuŝas granda stoko da leteroj, kiujn oni ne povas enmanigi al la adresatoj pro malbone skribita adreso.

[1]) Mi volonte rekomendos kelkajn el miaj gelernantoj (11—14jaraj) por tiu eksperimento.

Ĉe la laboruloj.

UKRAINIA SINDIKATARO ENPROGRAMIGAS ESPERANTO-AGADON!

Ofte okazas, ke diversaj organizoj, unioj, asocioj, kongresoj bondeziras aŭ voĉdonas por esperanto. Sed malofte ni vidas, ke iu organizo *konkrete* enprogramigu ĉe si la esperanto-agadon kaj donu al siaj filioj kaj fakoj *realajn* direktivojn pri la farenda laboro.

Tial estas treege valoraj la dokumentoj dissenditaj de l' ukrainia sindikata centro. La dokumentoj tiaspecaj estas ĝis nun tiom maloftaj, ke ni publikigas la plej interesajn partojn el ili.

La direktivo konsistas el tri dokumentoj:

I. *Direktiva cirkulero*

(Ni publikigas preskaŭ la tutan tekston.)

Tutukrainia Soveto
de Profesiaj Sindikatoj.
24. 10. 27
N-o 5/612.
(en Ĥarkov).

Al ĉiuj tutukrainiaj komitatoj[1]) kaj distriktaj intersindikataj sovetoj[2]).

"Pri Helpo al disvolviĝo de l' Internacia Laborista Korespondado" (Esperanto).

Konklude el la treega graveco de l' internacia laborista korespondado, kiu estas unu el plej bonaj formoj de internacieca edukado, edukado de larĝaj laboristaj amasoj al agema internacia proleta solidareco, — la klerigkonferenco de "VUSPS"[3]), okazinta 8. sept. 1926, alprenis decidon pri helpo al aranĝado de internacia laborista korespondado kaj al laboro de esperanto-rondetoj de laboristaj kluboj kaj de laborejoj.

Eksperimento de apliko de internacia lingvo esperanto por korespondado kun alilandaj proletoj en pluraj urboj de Ukrainio montris bonajn rezultojn kaj jesigis la ĝustecon de l' alprenita decido kaj la alkonformecon de plua disvolvigo de ĉi nova formo de klerig-agado. La esperanto-rondetoj, organizitaj en multaj lokoj, pruvis sian celkonformecon ankaŭ por la disvastigo de l' vero pri Sovet-Unio inter la korespondantoj de niaj rondetoj.

Konsiderante, ke la disvolvigo de l' internacia laborista korespondado postulas decan atenton flanke de l' sindikataj organizoj, — klerigfako de "VUSPS"... dissendas al vi la liston de l' plej necesa libraro por ĉi agadfako. La klerigfako rekomendas al vi zorgi por ke ne malfortiĝu la laboro de l' reto de esperanto-rondetoj ĉe laboristaj kluboj kaj laborejoj, kaj peni por la provizado de l' sindikataj kaj klubaj bibliotekoj je popularaj libroj pri internacia korespondado kaj esperanto... Se ĉe iu distrikta intersindikata Soveto, la esperanto-konsultejo ne ankoraŭ estas organizita, ni rekomendas, kiam al vi sin turnos la organizo de SEU, helpi la fondon de tia konsultejo laŭbaze de l' "Statuto".

Por necesaj pluaj informoj pri ĉi agadfako oni sin turnu al klerigfako de VUSPS.

Rabiĉev,
(estro de klerigfako de VUSPS).
Kenigsberg (sekretario).

II.

La dua dokumento estas "Listo de libroj pri internacia korespondado kaj esperanto, rekomenditaj por klubaj kaj sindikataj bibliotekoj, kaj rondetoj".

---

[1]) En Ukrainio funkcias 21 sindikatoj.

[2]) En Ukrainio funkcias 42 distriktaj Sovetoj (laŭ la nombro de distriktoj).

[3]) Komencliteraro nacilingva de l' Tutukrainia Soveto de Prof. Sindikatoj.

La listo enhavas 8 informajn (propagandajn) eldonaĵojn kaj 8 porlernajn eldonaĵojn: lernolibrojn, vortarojn (enestas ankaŭ *"Petro")*.

III.

Precipe interesplena estas la *"Provizora Statuto pri agado de Esperanto-Konsultejo"*.

Laŭ ĉi statuto ĉe ĉiu distrikta intersindikata Soveto estas fondebla, laŭ petdeklaro de l' SEU-filio, *"Esperanto-Konsultejo"*.

La Konsultejo troviĝas sub la morala gvido de l' intersindikata Soveto.

Ĝi informas, konsultas al ĉiuj demandoj pri organizo de peresperanta korespondado, pri la esp-a movado, pri ellerno de esp-o; rekomendas lernolibrojn; helpas al esp-o-lernantoj; ĝi rajtas aranĝi ĉie lekciojn kaj raportojn por laboristoj: dum kunvenoj, en klubejoj, ankaŭ per Radio; ĝi aranĝas ekspoziciojn; ĝi rajtas organizi kursojn de esperanto-grupgvidantoj, konferencojn esperantistajn; ĝi akcelas la fondon kaj funkciadon de esp-o-rondetoj por laboristoj.

La Konsultejo devas priservi: sindikatajn organizojn, laboristajn klubojn (kaj rondetojn), ĉiujn sindikatanojn (kaj la familianojn, nutratajn de tiuj sindikatanoj), se tiuj organizoj aŭ personoj sin turnas al la Konsultejo.

La Konsultejo dum siaj funkciad-horoj ricevas la ejon necesan en Labor-Palaco, Sindikatara Hejmo aŭ unu el la plej gravaj kluboj de l' loko...

Komentoj estas superfluaj. Tiaj dokumentoj pruvas, ke proksimiĝas la tago, kiam ĉie la aplikado kaj propagando por la mondlingvo fariĝos la afero de tiuj, kiuj mem eluzas la utilecon de nia tutproletara interkomprenilo.

Dneprano.

*

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

Germanio. Laborista esperanta. societo Zwickau aranĝas depost la 6. sept. la duan kurson por komencantoj; ĝi okazas ĉiumerkrede je la 8 h. en Alte Schule. Partoprenas 15 ge-lernantoj. — **Sovetio.** *Batum* (Kaŭkazo). Ĉe la Klubo de la N-Regimento estas organizita esp.-rondeto, konsistanta el 24 ruĝarmeanoj k. oficiroj. La esperanto-kurson gvidas K-do A. Tanner. — *Kremenĉug.* — La esp-o-organizo, en kontakto kun IRH.-filio kaj Intersindikata Soveto, aranĝis, por la honoro de X-jara datreveno de l' Revolucio, "Ekspozicion de Internacia Koresp-ado". La Ekspozicio enhavis fakojn: *Vivo kaj batalo de l' eksterlanda Proletaro* (kun "anguletoj": "anglia striko", "afrikaj vivkondiĉoj", "kion konstruis laborista mano", "virino en revolucio". "vivo de francia fiŝistaro", "novaĵoj el ĉie" ktp.), *Korespondado kun Ruĝ-Front-anoj; IRH-korespondado; Komunist-Infana-Koresp-ado; Lenin en eksterlanda gazetaro; Alilanda lab. Gazetaro; Alilandaj lab. ilustraĵoj; Ateista koresp-ado...* Unuafoje, ni povis montri tiom enhav-riĉajn kaj interesplenajn materialojn. La 2000 gelaboristoj kaj lernantoj, vizitintaj la ekspozicion, restis bonege impresitaj. Dum la fest-tagoj en gazeto *"Kremenĉugskij Raboĉij"* aperis la elesperantaj salutoj de Ruĝ-Front-anaro Orient-Saksia, RFB Leipzig, taĉm. I, Komunista Laboristaro de München, "Jun-pioniroj" el Amsterdam, Prolet-Kleriga Ligo "Plebs" el Nova-Zelando. La nepublikigitaj salutoj estis prelegitaj ĉe la ekspozicio. Bonegan impreson kaŭzis ĉe la ĉi-tiea kom. infanaro standardo donacalsendita de "Jun-pioniroj" el Amsterdam por "Jun-pioniroj" ĉi-tieaj *(la surskribaĵo nur en esp-o!).* Kunveno de sindikat-reprezentantoj la 14. 10. voĉdonis rezolucion kun pluaj konkretaj priesp-aj tezoj. — *Krjukov ap. Dnepro.* — La esperantistaro, dum la Jubileaj tagoj, aranĝis ekspozicion de siaj korespondaĵoj en klubo "Kotlov". La sukceso estas bona: 700 vizitintoj, oni klopodas por fondo de novaj rondetoj.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Katalogo de lingvoj naturaj, popolaj, literaturaj, klasikaj kaj artefaritaj. (Provizora listo), 100 ekz. — Prezo: 2 sv. fr. Eld: UEA, Genève.

Ŝajne, ke la "flankaj gajnoj" de UEA estis tre bonaj. Ili certe kovris jam ĝian deficiton kaj la multajn vojaĝojn, ĉar UEA jam permesas al si eldoni la supran libron. Tiu "Katalogo" nek kompleta nek detala prezentas nenian valoron, krom la elspezigo de mono. *Verama.*

Ĉu vi jam renovigis vian membrecon al SAT?

★ DIVERSAĴOJ ★

PRI ĈINA GAZET-SERVO

Post apero de anonceto en "S-ulo" pri ĉina gazet-servo ni ricevis multe da leteroj el preskaŭ ĉiuj partoj de l' mondo petantaj novaĵojn pri la ĉi-tiea revolucio. Pro diversaj kaŭzoj mi ne povis respondi al ĉiuj. Post la ŝanĝiĝo de politika situacio en Ŝanhajo, estis tre malfacile funkciigi la gazet-servon. La efektiviĝo de nia plano devas do prokrastiĝi, ĝis la politika situacio pliboniĝos. Intertempe mi promesas ofte sendadi informojn al "S-ulo" pri ĉinaj politikaj kaj ekonomiaj aferoj, se la cirkonstancoj tion permesas al mi.

Ŝanhajo, 3. 11. 27.

SAT-ano (3503).

* * *

ONI PETAS

Ke K-doj el ĉiuj landoj, krom Sovetio kaj Britio, sendu statistikojn kaj ĝeneralan informon pri Naskevitado, Eŭĝeniko kaj Malthusianismo en sia lando, por uzi en la preparado de verko eldonota de SAT. Adresu al Redaktejo de "S-ulo".

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo":

Pravda, Plzen, ?: Komunistaj Universitatoj.

Enhavis priesperantajn artikolojn:

Jedinstvo, Sofia, 16. 11. 27. — *Le Bellevillois,* Paris, novembro 27. — *Nakovadnia* Sofia, novembro 27. — *Pravda,* Plzen, ?.

Rostov'aj SAT-anoj okaze de la 10-jara datreveno de Oktobra Revolucio ricevis salutleterojn de ekstersovetiaj K-doj, kiuj estas presitaj en jenaj ĵurnaloj de Nord-Kaŭkazio: *"Molot",* Rostov-Don, 7. 11. 27 (el Svedio, Holando, Estonio). — *"Leninec",* Rostov-Don, 7. 11. 27 (el Anglio, Latvio, Belgio, Jugoslavio). — *"Krasnoje Priazovije",* Azov, 7. 11. 27 (el Svedio, Estonio). — *"Trudovaj Putj",* Armavir, 7. 11. 27 (el Estonio, Holando). — *"Sovetskij Paĥarj",* Rostov-Don, 5. 11. 27 (el Svisio). — *"Krasnij Ŝaĥter",* Ŝaĥty, 5. 11. 27 (el Francio, Jugoslavio). — *"Vlastj Sovetov",* Stavropol, 2. 11. 27 (el Svedio, Jugoslavio). — Al ĉiuj salutsendintoj Rostov-Don'aj SAT-anoj esprimis proletan, fratan dankon.

NIA POŜTO

9499. — Via "Tago" estas tro nesufiĉa por esti presinda.

10072. — Vian tradukon ni certe uzos.

Al kelkaj. — Certe ni pretas peri la leterojn, sed oni ne deziru, ke SAT pagas tiun afrankon. Estonte ni nur peras leterojn, se la sendanto almetas la ekvivalenton de 0,50 mk. germ. *Adm.*

4899. — Monon ni ricevis! *Adm.*

K·O·R·E·S·P·O·N·D·A·D·O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Bulgario.

K-doj *Ŝkodrov* k. *Matev* (kotonteksistoj) en fabrikejo "Princ-Kiril", *Gabrovo,* dez. koresp-adon kun ĉiul. samfakanoj pri la kondiĉoj de laboro, tagsalajro, teksaĵspecimenoj hig-radinstaloj k. pri ĉ. aferoj, rilatantaj teksindustrion. Interŝ. teksaĵspecimenojn. Resp. certa.

K-do *Stanĉo Dimitriev, Ruse,* dez. ricevi esp-aĵojn por ekspozicio.

K-do *M. Iv. Bardarov,* meblisto (22 j.), str. "Sveti Naum" Nr. 9, *Ruse,* dez. koresp. kun samprofesiuloj el ĉ. l.

Ĉeĥoslovakio.

Adresŝanĝo: K-do *Robert Burkert,* Lungenheilstätte, *Marschendorf, IV.* (antaŭe en Tannwald).

K-do *H. Hoŝtalek* (arbar-inĝeniero), Komenská 62, *Ĉ. Budêjovice,* dez. koresp. pri laboreblecoj en sia fako en Sovetio.

Danio

Kamaradoj! Sendu salutojn al nia SAT-propaganda vespero, kiu okazos la 10. dec. 1927. Adr.: K-do *Harry Nielsen,* Kochsg. 47, II., *Odense.*

Estonio.

K-do *Leongard Klaaser,* Kunderi tän. 10—20, *Tallinn,* dez. interŝ. L. kun junaj gekomunistoj el ĉ. l.

Francio.

K-do *L. Janka,* Rue du College, 84, *Roubaix* (Nord), dez. interŝ. PM. kĉl., krom Germanio. Tuja resp. garantiata.

Germanio.

K-do *Karl Berthold,* Alter Markt, 31, *Halle a. S.,* dez. koresp. pri lab. movado k. a. temoj kĉl. Resp. garantiata.

— 30 infanoj (12—15 jaraĝaj) k. junuloj ĝis 25 j. dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Certe resp. Adr.: K-do *R. Graetz,* Waldemarstr. No. 17, *Rostock.*

Adresŝanĝo: K-do *Gustav Hindorf,* Bartelsstrasse 122, III. r., *Hamburg, 6* (antaŭe en Altona).

— Multaj batalantoj el la urbo de malluma mezepokeco serĉas korespondadon pri: Sacco, anarkiismo, fiziokratio, socialismo ktp. Skribu el ĉie, precipe Anglio, Francio, Sovetio, Hindio k. Ĉinio. Adr.: *F. Kick,* Lechenicherstr. 3, *Köln.*

Hungario.

K-do *Karl Benedek,* komizo de tekskomerco, Major-str. 23, *Péĉ,* dez. daŭre koresp. kun samprofesiuloj el ĉ. l., pri ĉ. temoj. Certe resp.

Gek-doj! Kiuj volas serioze k. konstante koresp. pri seriozaj temoj kun sincera espisto, tiuj bonvolu skribi al K-do *Jozefo Kotvics,* Széchényi-ujjtelep, 165, sz., *Szentes.*

Sovetio.

K-do *M. S. Ŝaraĥan, Novominskaja,* Donskogo okruga, dez. koresp. kĉl.

Adresŝanĝo: K-do *B. Ĵeleznjakov,* Ĵeleznodorojnij posjolok, Staro-Bujanovskaja, 17, *Samara* (antaŭe en Sverdlovsk, poste en Ileckaja Zaŝĉita).

— Jenaj Gek-doj en *Zavitaja,* Amurska okr., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj: *A. M. Legkij* (instruisto), *V. N. Grjebovskij* (fervojlaboristo), *V. V. Feliksov* (Rajsojuz), *A. V. Ageev* (RIK), *M. G. Lapuzo,* (poŝtestro), *St. J. Sostavkin, Maksim Burbelo, A. J. Plaucino, S. V. Gavrilov, S. N. Skorov, F. Iv. Knjazev, I. St. Sostavkin (Ilj.), T. T. Minceva* (instruistino), *M. I. Trahtenberg* (kontoro).

— Gelernantoj de *Zavitaja sepjara lernejo* dez. koresp. kun ĉiul. gelernantoj. Adr.: *Zavitaja,* Amurska okr., al K-doj: *G. P. Kojnov, B. A. Kostrikin, A. K. Mitiŝov, N. Kamŝlov, M. A. Iljin,* K-dinoj: *A. E. Voronova, L. Potemina, A. Goluŝko, R. Staricina, A. P. Bojkov, M. P. Maloviĉko, V. Kolesnikova, Kl. Kovalevskaja, G. Klemenko.*

K-do *P. V. Mokrecov* (invalido, SAT-5088) loĝas de 1. 10. 1927 en *Oranienbaum,* Lening. okr., Lesnaja ul. 5, kv. 1.

Adresŝanĝo: K-do *Demetrio Pogorelov* (5403), Starovirska 28, loĝ. 5, *Harkov,* Ukrainio (antaŭe en Kamenec-Podolsk).

— *Klubo je la nomo de Smirnov, Naro-Fominsk,* Mosk. gub., dez. koresp. pri radiotekniko kĉl.

K-do *M. Andreev, st. Ĉerdjuj,* Sr.-Az. ĵel. dor. vokzal, telegraf, Turkmenistan, dez. koresp. kĉl. precipe kun fervojtelegrafistoj, ankaŭ peras kolektivan koresp-adon por profunuiĝoj, klubo, mur- k. laŭtparolilaj gazetoj fervojistaj.

K-do *V. D. Kubanov,* Kladbisĉinskaja, 101, *Slavjanskaja,* Kub. okr., dez. koresp. kun junlaboristoj pri ekonomia vivo kĉl. L. Resp. garantiata.

K-do *E. Martinenko,* Bazarnaja ul. 61, kv. 9, *Dnepropetrovsk,* dez. koresp. pri div. temoj kĉl. L, PK, PI. Resp. garantiata.

— Radio-rondeto ĉe Komsomola Klubo dez. koresp. pri radio-movado. Adr. *Rostov-Don,* Puŝkinskaja ul. 94, *Radio-Krujok Kluba Komsomola.*

— Serioza filatelisto interŝ. PM. Resp. garantiata. Adr.: *Moskva, 21,* ul. Usaĉeva, 19 A, Korpus 4, kv. 4, K-do *Vl. Lysenko.*

K-do *Isajev,* Artilerijskaja, 78, *Batum, Gorodok,* dez. koresp. kĉl. precipe kun fotoamatoroj, militistoj k. labkoroj, pri ĉ. temoj.

K-do *Salnikov,* vil. *Mihnoviĉi,* Smolensk. gub. i ujezd, Boĥotskaja vol., dez. koresp. kun komencantaj esp-istoj, instruistoj kaj kamparanoj.

— Distriktaj kompartia, komjunula, pionira, profsindikata komitatoj, mezlernejoj, domo de klerigistoj k. prof. klubo serĉas koresp-antojn en ĉ. parto de la terglobo. Samtempe K-do Genŝaft sciigas sian novan adreson. Ĉion adresu al: K-do *P. Antonoviĉ,* Avraamievskaja, 7, *Smolensk.*

K-do *Nikolao Dulebov, Zavitaja,* Amurska okr., serĉas ŝakludantojn.

Adresŝanĝo: K-do *Georgo Girin,* Superkooperativa kurso de Centrosojuzo, *Leningrad* (antaŭe en Zavitaj Amur. okr.).

K-do *I. E. Makŝakov,* Puŝkinskaja 214, kv. 1, *Rostov-Don,* dez. seriozan k. daŭran koresp.-adon pri lab. vivo k. laboro, kĉl. Skribu multnombre! Resp. garantiata.

— La Junular-Rondeto serĉas koresp.-antojn el ĉl. pri problemoj de Junular-movado ktp. Adr.: *S. Holesniĉenko,* Sovetskaja 19, *Brjansk.*

GEKAMARADOJ!

Kiu povas informi min pri mia bofrato *Stefano Benedek?* — Dum la mondmilito li estis soldato kaj malaperis en la jaro 1916 sur la rusa fronto. — Elkoran dankon! Informojn sendu al: K-do **Jozefo Kotvics,** Széchényi-ujjtelep, 165, sz., **Szentes** (Hungario).

ATENTU!

Nia LEA-rondo intencas aranĝi esp. ekspozicion kaj propagand-vesperon. La SAT-anoj estas petataj sendi al ni ekspoziciaĵojn, esp-aĵojn kaj propagand-materialon. L, PI, bfl. ktp. — Ĉio estos respondata. Adresu al: K-do **J. Krieg,** Alsenstr. 4, **Barmen** (Germ.).

ATENTU!

SEU-ĉelo de f-ka klubo "Ruĝlaboristino" dez. koresp. kun grupoj kaj individuoj pri ĉ. temoj, L, PK, PI, gaz. Peras al murgazetoj k. lab. organizoj. Adr.: **A. Z. Koritova,** Glavkontora Sosnevska M.-ro **Ivanov-Voznesensk** (Sovetio).

ENHAVO:

Pli bone aŭ malplibone?, trad. 6600 . . . pĝ. 73
Letero el sendependa Jugoslavio, de 10 164 . . . . „ 74
Hungara polico torturas, trad. E. E. Y. . . . . „ 74
Laborista Radio-Stacio . . . . . „ 75
Kiel sovetiaj laboruloj subtenas sian registaron, de Baranov V. „ 75
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo, de E. Lanty . . „ 75
Nacia laborista universitato . . „ 76
Humoraĵo . . . . „ 76
Sennaciula Studenta Paĝo . . . „ 77
Tra Esperantio . . . . „ 78—80
Korespondado, anoncoj . . . . . „ 80

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)